

Pola

Nro 4-5

Augusto

1946

Sierpień

Septembro

Wrzesień

Jaro

XXXIV

Rok

Esperantisto

Esperantysta Polski

monata organo de Asocio de Esperantistoj en Pollando

URGHAS!

Dum la Ĝenerala Kunveno de delegitoj de A. E. P. en Łódź oni starigis proponon, ke Asocio de Esperantistoj en Pollando alighu al I. E. L. Nin ne interesas la propono mem, sed la resonado, kiun ĝi kaŭzis. La propono elvokis longedaŭran kaj viglan diskuton, dum kiu oni substrekiis certajn momentojn de ĝenerala valoro. Oni atentigis, ke la esperanta movado posedas multajn reprezentantojn, sed neniu el ili estas vera reprezentanto de nia movado. Oni ne povas nei tiun ĉi konstataĵon, ĉar verdire oni povas rajte demandi, kiu el la ekzistantaj asocioj aŭ ligoj reprezentas tutaĵon esperantistaron. Ĉu eble U. E. A., I. E. L., S. A. T., I. K. U. E. aŭ aliaj kiel ili estas nomataj? Ĉiu el ili reprezentas nur parton de la movado kaj neniu povas pretendi esti centro de la movado. Ĉiu el ili kalkulas en plej bona okazo po kelkmilo da membroj, sed neniu rajtas esti reprezentanto de la tutajho.

Sed ni devas demandi, ĉu tiu ĉi stato estas utila por la movado kaj ĉu ĝi ne estas ŝanĝinda? Ĉu la bono de nia afero ne postulas ĝian ŝanĝon? Ĉu en nunaj cirkonstancoj, en periodo de UNO kaj UNESCO ne estas necese posedi unu centran organizadon, kiu rajtus diri, ke ĝi estas sola reprezentanto de ĉiuj esperantistoj? Ŝajnas, ke je tiuj ĉi demandoj povas esti nur unu respondo: ĝi estu!

Oni eble respondos je nia postulo per riproĉo, ke ĉiu el la ekzistantaj asocioj aŭ ligoj reprezentas siajn apartajn, tre diversajn interesojn, ĉu ideajn ĉu profesiajn, do ili ne povas troviĝi sub unu tegmento! Argumento niaopinie tre facile refutebla! Certe ĉiu asocio reprezentas kaj propagandas tre gravajn kaj valorajn laŭ sia vidpunkto ideojn kaj ĝi estas subteninda en sia laboro, sed

intereson de individuoj kaj grupoj superas la bono de la tutajho, la bono de nia movado. Ni chiu celas la samon, kvankam chiu lau sia maniero kaj metodo. Ekzistas do neniu prudenta kialo, kiu malhelpus atingi interkonsenton inter diversaj asocioj, krom ambicioj chu personaj chu prestigaj, kiujn oni devas tiu chi-oka-ze flankenmeti.

Chu estas necese citi faktojn por pruvi la suprediritan?! Ni citu ekz. la lastan iniciaton de I. E. L., kiu celis kolektadon de deklaracioj por Esperanto en diversaj landoj por prezenti ilin al UNO. Ni ne parolu nun pri la demando, chu la iniciato estis ghusta au ne, chu oni elektis celkonscian vojon au ne, temas pri tio, kiel estis akceptita la iniciato de aliaj asocioj kaj kiajn sekvojn ghi rezultos? Char ghin entreprenis „neutrala“ organizajho, aliaj rifuzis ghin partopreni pro ideaj kauzoj. Kaj kia estos la rezulto? Se I. E. L. ech sukcesus kolekti cent mil da deklaracioj, UNO rajtos demandi, chu I. E. L. reprezentas la tutan esperantistaron, kion ghi ne povas atribui al si. La rezulto de la iniciato povas facile farighi nula.

Ke nia voko ne estas izolata, tion pravas la diskuto dum la Tutpola kongreso en Łódź, tion pravas la alvoko de dro T. Ken en januara numero de „Flandra Esperantisto“, tion pravas la diskuto en la lastaj numeroj de „Sennaciulo“! La neceso de interkonsento farighas tre evidenta kaj nediskutebla.

Pri la praktika kaj teknika solvo de la demando ni ne volas jam paroli, tio estas afero de kiel eble plej proksima estontece. Nun oni devas nepre starigi specialan komisionon, ni nomu ghin: Interkonsenta Komisiono, al kiu chiu internacia asocio au ligo delegus sian reprezentanton kaj kiu ellaborus chefajn punktojn de la interkomprenigho koncerne starigon de la chefa organizajho, kiu unuigus chiujn internaciajn asociojn kaj estus vera reprezentanto de la esperanta movado.

Al tiu chi reprezentantaro apartenus chiuj naciaj asocioj, internaciaj asocioj kiel U. E. A. kaj I. E. L. (kiuj cetere povus kunfandighi en unu grandan organizajhon), internaciaj ideaj asocioj kiel S. A. T., IKUE ktp., fakaj kaj profesiaj organizajhoj, kaj multaj aliaj. Tiu chi organizajho ampleksanta chiujn ekzistantajn asociojn estus vere internacia esperanta reprezentanto de la movado kaj ghia forto estus nombrata lau multmila cifero de la membroj. Tiu chi projekto ne estas utopio! Pli utopiaj projektoj farighis en la nuntempo realajho, ke mi citu: UNO! Ghi estas efektivebla nur per bona volo de tiuj, de kiuj dependas la interkonsento kaj en ilian bonan volon ni ne volas dubi.

Tiu chi nia voko ne restu nur „voko en la dezerto“, ghi devas elvoki potencan ehon en chiu landoj, che chiu bonvolaj

samideanoj, por kiuj la prospero de nia ideo staras je la frunto de niaj penoj. Tial ni alvokas chiujn esperantajn gazetojn, ke ili deklaru sian sintenon koncerne la demandon, ke ili sincere kritiku nin, se ni ne pravas, ni alvokas chiujn asociojn, ke ili ekprenu la iniciaton en siajn manojn, sed ne prisilentu la demandon, ĉar tiam ghi estus mortigata antaŭ la naskiĝo! Ni atendas publikan diskuton pri la temo, sed precipe **ni atendas la agon!**

La tempo rapide flugas, en la mondo okazas gravaj faktoj, kiuj influas la vivon de multaj nacioj, la internaciaj rilatoj estas tiel komplikitaj kaj ofte ech dangheraj, ke solvo de la internacia lingvo trudas sin per si mem. Tial estas necese, ke ni ne preterlasu la okazon.

La afero urghas, **tre urghas!**

Alf.

Noto: Jam post finskribo de ĉi tiu artikolo ni ricevis jenan komunikon, kiun ni represas por informo de interesatoj:

I. E. L. kaj U. E. A.

Kunveno okazis en Bern la 21/22-an de Julio 1946 inter reprezentantoj de I. E. L. kaj U. E. A. por interkonsenti pri kunfandigho de la du organizajhoj kaj por chesigi la duecon en la Esperanto-movado.

Post du tagoj de tre amika diskuto oni trovis favoran bazon nun submetotan al la du komitatoj. La trovita interkonsento respondos al la celoj de la du partoj de la movado kaj certe ghojigos la tutan Esperantistaron.

Partoprenis: C. C. Goldsmith, Hans Jakob, Hans Kursteiner, G. Rotach.

Prezidis: Prof. Edmond Privat.

SEPTEMBRO, MONATO DE REKONSTRUO DE VARSOVIO

La unuan de septembro pasis la sepa datreveno de la barbara atako de Hitler kontraŭ Pollando kaj komencigo de la dua tutmonda milito. Sep malfacilaj jaroj pasis ekde la momento, kiam dum la unua septembra, bela mateno super la ĉefurbo de Pollando ekmughis la bombaviadiloj kaj resonoj de eksplodantaj bomboj malkvietigis la trankvilon de la miliona urbo. La unuan fojon, poste chiam pli ofte, la pavimo de Varsovio makulita estis per sango de infanoj kaj virinoj, per la sango de la senarmila civila loĝantaro.

Malice estis atakita Pollando kaj ghia ĉefurbo Varsovio!

Germanoj volis detru la koron de la lando. Ili volis tranĉi la nervojn, kondukantajn al ĝhia cerbo.

Detruante la ĉefurbon la malamiko pensis pri la tuta lando. Tio estis antaŭdiro de tio, kio sekvos poste. La forlasita de tiama registaro loĝantaro de Varsovio kuraghe kontraŭstaris la alvenantajn motorigitajn hordojn de la moderna Atillo. Dank' al la superantaj fortoj rompita estis la kontraŭstaro, sed ne humiligita la spirito de la loĝantaro de la ĉefurbo de Pollando.

Post okupo de Varsovio germanoj komencis sisteme detruadi ĉion, kio kunligita estis kun la pola kulturo, ĉion, kio povis memori al la popolo pri ĝhia memstara ekzistado.

Detruita estas monumento al Mickiewicz, la plej granda poeto kaj profeto pola, kies la plej eminenta verko „Sinjoro Tadeo“ estas ankaŭ tradukita Esperanten. Monumento al Chopin, genia majstro de l'tonoj estis fandita je armiloj. Oni forveturigis monumenton al la pola nacia heroo princo Poniatowski, chizita de fama Thornwaldsen. Ie kashita estis la monumento al la heroo botisto-kolonelo Kiliński, kiu nur antaŭ ne longe revenis sur sian iaman lokon. Detruitaj estis aliaj monumentoj, memorigantaj la venkojn de pola soldato. Oni detruis ĉion, kio povis memori, ke Varsovio estis la ĉefurbo de Pollando. Tio estis la komenco de la satana plano, lau kiu el Varsovio devis resti nur malgranda kvartalo germana...

Provokite de germanoj eksplodis en la jaro 1943 en la Juda Kvartalo, en la „geto“ ribelo. La judoj volis almenaŭ honore morti. Responde germanoj detruis pli ol mil domojn, situatajn en iam la plej industria kaj komerca urbparto. Ili ne nur detruis, sed ankaŭ eksplodigis la fundamentojn. Nun, tie, kie iam bolis la vivo, estas amaso da rubo', herbkovrita, regas morta tombeja trankvilo...

Ne povis rompi la spiriton de la loĝantoj de la ĉefurbo diversaj ordonoj kaj persekutoj. Varsovio ĉiam estis la vojmontrilo por la tuta lando kaj popolo.

Kaj kiam en aŭgusto de la jaro 1944a eksplodis en Varsovio la tragedia insurekcio, la loĝantaro de la ĉefurbo sen diferenco de politikaj vidpunktoj prenis armilojn kaj iris amase sur barikadojn batali kontraŭ la malamata malamiko. Kontraŭ la germanaj „tigroj“ kaj „panteroj“ ekstaris junulo kun botelo da benzino, kontraŭ la peza artilerio kaj bombhetiloj ekaperis knabino kun revolvero au fusilo en la mano. La insurekcio estis antaŭdestinita je malsukceso, sed heroeco de ĝhiaj partoprenintoj transiris en la historion.

Venis la likvido de Varsovio. Lau la plano oni detruis kaj

Elis. J. J.
 bruligis domon post la domo. Malnova urbparto kun la bela polihromio, katedralo de Sankta Johano, la sola pura gotikajho en Pollando, preghejoj, muzeoj, teatroj, bibliotekoj, loghdomoj chesis ekzisti.

Super la chefurbo de Pollando altenighis maro da fajro kaj la densa fumo, kiel funebra krepo kovris chirkauajhojn de la brulanta Varsovio. Sangis la koro de Pollando! Povis shajni, ke Varsovio kiel chefurbo, kiel centro politika kaj kultura chesis ekzisti.

Sed la demokrata registaro de la liberigita Pollando, antaueghante kun la venkira Rugha Armeo kaj la Pola Militistaro ne elektis kiel sian sidejon Krakovon, la urbon de iama brila pasinteco, kie spiritoj de la polaj reghoj shvebas super la pramalnova Vavelkastelo, sed kie estis ankau la „chefurbo“ de la Ghenerala Gubernio; ankau oni ne elektis Lodzon, la netushitan de la milito urbon de fabrikaj kamentuboj, sed ghi saghe transportis sian sidejon al la antaurbo de Varsovio — Praga, mirakle preskau neruinigita.

Ne estis akvo, lumo, gaso, komunikiloj, stratoj de la chefurbo estis supershutitaj de rubo, mur-kaj ferrestajhoj, sed forta estas la volo de la registaro, nehezitebla la deziro de la loghantaro, kiu meze de multaj malfacilajhoj kaj maloportunajhoj rekonstruas sian amatan urbon!

Kaj nun, dudek monatojn post la liberigho, preskau chiuj domoj kaj stratoj estas lumigitaj, estas akvo, gaso, funkcias telefonoj, oni elveturigis dekmilojn da kubaj metroj da rubo, tra stratoj de l'urbo, chirkautaj de ruinoj, similantaj al iaj strangaj dekoraciajhoj rapidas tramoj kaj trolejbusoj, fiere altihas la konstruajho de la unua regna teatro, funkcias ankoraŭ kvin pluaj teatroj, kvar kinejoj (ankoraŭ du estos malfermataj dum la plej proksimaj semajnoj), per la bela arko de la ponto je la nomo de Poniatowski, konstruita dum la rekorda tempo estas kunligitaj la ambau bordoj de Vistulo, rekonstruita estas ankau la fervoja ponto, preskau chiutage oni donas konstruajhojn por dispono de kulturaj kaj administraj organizoj. Varsovio aperas el la rubo, Varsovio bolas per pli ol duonmilionaj loghantaro, Varsovio vivas!

Rekonstruo de Varsovio farighis jam zorgo de la tuta lando. La monato septembro, dum kiu per la bombardado de la chefurbo de Pollando komencighis la dua mondmilito estas deklarita kiel monato de rekonstruo de Varsovio. En la tuta lando estas fonditaj pli ol tri mil komunumajn, distriktajn, urbajn komitatojn por la rekonstruo de Varsovio, kiuj organizas la socian agadon por tiu chi celo.

Kaj ghuste diris civitano Bierut, la Prezidanto de la Landa Nacia Konsilantaro:

„La komunuma strechigho de laboristo el Łódź, Silezio, de vilaghano el la Lublina vojevodio au el Pomeranio, de koloniiganto el la Teroj Reakiritaj, strechigho de inteligentulo kaj scienculo konstruos Varsovion, kiu estos la ĉefurbo de ĉiuj, al kiu ĉiu polo donos parton de sia koro. Tiu ĉi strechigho ankoraŭ pli forte kunligos kaj kunfandos niajn vicojn, la vicojn de konstruantoj de Pollando, pli bona kaj pli felicha“.

L. Dratwer

KOMUNIKOJ DE A. E. P.

La 10. de julio kj. estis alprenita de la Ĉefa Estraro de A. E. P., la suba

REGULARO POR SEKCIOJ de A. E. P.

§ 1. Lau art. 6 p. d) de la regularo de A. E. P. la membroj de la Asocio rajtas fondi ĉe ĝi sendependajn sekciojn fakajn kaj ideajn, kiel ekz. laboristan, pedagogian, skoltan, studentan, artistan kpt., kies agadkampo estas tuta lando.

§ 2. Membroj de la sekcio pagas kotizon destinitan nur por celoj de la sekcio kaj fiksas ĝin la estraro de la sekcio; jaran raporton oni submetas al la Ĉefa Estraro de la Asocio por sciigo kaj budgheton por konfirmo. 10% da pura profito ricevas la Ĉefa Estraro de la Asocio.

§ 3. La estraro de la sekcio konsistas minimume de prezidanto, ĝhia anstataŭanto, sekretario kaj kasisto kaj estas elektata ĉiujare dum Ĝenerala Kunveno de la delegitoj de A. E. P. de la sekcimembroj. La sekcio gvidas aparte sian kason, kiu estas submetata al kontrolo flanke de la Revizia Komisiono de la Asocio resp. de la grupoj.

§ 4. La ideoj kaj programaj montriloj de la sekcio estas decidataj dum la jara kunveno de la sekcio kaj ili devas esti konformaj al decidoj de la asocia regularo (art. 3). La sekcio rajtas fondi lokajn sekciojn ĉe la grupoj de la Asocio.

§ 5. Eldonagado de libroj, gazetoj kaj propagandiloj estas interna afero de la estraro de la sekcio post konfirmo flanke de la Ĉefa Estraro de la Asocio.

§ 6. Jaraj raportoj de la sekcioj estas enmetatoj en la jaran raporton de la Asocio. Ili povas esti eldonitaj aparte por celoj de la sekcio.

*

Lau la decidoj akceptitaj dum la Ĝen. Kunveno de delegitoj en Łódź ĉi-jare la Ĉefa Estraro de A. E. P. komunikas jenon:

1) Oni fondis che la Chefa Estraro Propagand-kasen, kies provizoj estos destinitaj nur por propagandaj celoj. Tial ni alvokas chiujn grupojn kaj ankau unuopajn samideanojn en Pollando, ke ili kolektu uzitajn, neuzitajn au nun jam plu ne validajn poshtmarkojn por plua intershangho kun eksterlando pere de A. E. P. kaj eventuala vendado en filateliaz komercejoj. Kolektitajn pm.-n oni devas sendi al la Chefa Estraro (Kraków, Rynek gl. 34) kun mencio: filatelia fako. Estas tute kompreneble, ke chiu samideano rajtas ankau pagi senpere monon al nia kaso por propagandaj celoj, ech tute ne kolektante poshtmarkojn.

2) Por organizi historian arkivon che la Chefa Estraro kaj Muzeon de pola esperantismo oni devas kolekti chiujn objektojn, notojn, fotojn, presajhojn, broshurojn, leterojn de esp. eminentuloj en Pollando (Zamenhof, Grabowski, Bujwid, Kabe ktp.), artikolojn en jhurnaloj kiam ajn aperintajn kaj sendi ilin kun eventualaj rimarkoj kaj klarigojn (kiel eble per presliteroj au mashinskribitaj) al la Chefa Estraro. Samtempe oni devas konstante kolektadi chiujn notajhojn, artikolojn kaj komunikojn aperantajn nun en chiutaga gazetaro, rilatantajn au esperanton au problemon de lingvo internacia ghenerale au iun ajn alian lingvon internacian (Basic English, Ido, Interlingua) au ech nur lingvan problemon favore por la ideo de lingvo internacia kaj sendi gazeton au tutan jhurnalon kun chirkaukadrita per rugha krajonu koncerna artikolo al la Chefa Estraro. Tiu chi materialo estas necesa por la tutpola arkivo, servonta kiel fonto de la scio pri esperanta movado en nia lando kaj por la lingvostudoj. Ni konsilas al chiu grupoj fondi similan eltranchajhkolekton de loka gazetaro por propraj celoj.

3) Pensante pri la fondo de Centra Biblioteko Esperanta la Chefa Estraro alvokas polan esprantistaron sendi chiujn posedatajn librojn superflujajn au almenau tiujn, kiujn ili posedas en pli granda kvanto al la Chefa Estraro. Nia movado forte malsatas je libroj. Ni povas ankau interperi en intershangho de la libroj kaj ni atendas proponcijn. Senditaj libroj restos proprajho de la sendanto kaj servos por migrantaj bibliotekoj au bezonoj de esperantistoj science laborantaj.

4) Por montri al neesperantistoj la praktikecon kaj uzeblecon de nia lingvo la Chefa Estraro decidis organizi Scienco-Intershangho Helpon lau jenaj principoj:

a) Esperantistoj (au grupoj) loghantaj en universitataj urboj devas almenau unufoje en la jaro (ekz. en komenco de la lernjaro) viziti sekretariejon de chiu fakultato kaj sciighi tie pri titoloj (en pola lingvo) de sciencistoj kaj nomojn de auroroj lau jena demandaro en nacia lingvo (traduku ghin nacilingven):

- I. Nomo de la altlernejo
- II. Adreso
- III. Fakultato
- IV. Nomaro de verkoj kaj publikajhoj de la lasta periodo.

Nro	Nomo de la aŭtoro	Titolo de la verko	Rimarkoj
-----	-------------------	--------------------	----------

En tiu ĉi rubriko oni devas mencii, ĉu la verko aperis en libro, kie, ĉu estis publikigita en formo de prelego, radiodisaŭdigo (kiam), ĉu ĝi estas ankoraŭ manuskripto kaj ĉu la aŭtoro konsentas je eventuala traduko esperanten por informi pri ĝia enhavo sciencistojn labrantajn en eksterlandaj altlernejoj.

Plej bone estus tiaj mashine skribitan demandaron enmanigi al dekano de la fakultato kaj peti lin, ke li sciigu pri la celo de la enketo siajn kunlaborantojn.

b) Legeble skribitan formularon oni sendas al la Ĉefa Estraro, kie ĝi estos tradukota esperanten kaj sendota al Esperanto-asocioj eksterlanden kun peto sciigi tiajn altlernejojn pri la enhavo de la demandaro. Ni petos samtempe, ke ili agu sammaniere, por ke ni povu utiligi iliajn sciigojn por niaj universitatoj.

c) Se oni postulos de ni tradukon de ia laboraĵo el la pola lingvo esperanten, ni faros tion pere de niaj kunlaborantoj en tuta Pollando. Samtempe ni petas samideanojn povantajn traduki tiajn laboraĵojn, ke ili komuniku al la Ĉefa Estraro siajn nomojn kaj sciencbranchon por ili plej bone konatan.

Ĉar la afero estas tre grava, serioza kaj por praktika propagando de nia lingvo grandsignifa, ni petas ĉiujn grupojn la aferon precize kaj akurate organizi kaj uzi por ĝi respondecajn homojn.

LISTO DE LA GRUPOJ DE A. E. P.

Por plifaciligi kontakton de la grupoj inter si kaj de izolaj samideanoj kun la grupoj ni donas ĉi-sube liston de jam ekzistantaj grupoj kun preciza ilia adreso:

Asocio de Esperantistoj en Pollando, Ĉefa Estraro: Kraków, Rynek gl. 34

grupo en Kraków, Rynek gl. 34, ofic., III etagho
 Warszawa, Al. Przyjaciół 9, B. Czechowski
 Łódź, Gdańska 44, B. Monkiewicz
 Gorlice, „Magdalena“, Świetlica Nafciarzy
 Chropaczów, Figuły 28, W. Lipok
 Szopienice, 3. Maja 28a, R. Sakmierda
 Sosnowiec, Targowa 9, Dro A. Ingster
 Bielsko, Mickiewicza 13, Fr. Walas

Gdańsk—Oliwa, Asnyka 2, Al. Koźuch
Radom, Żeromskiego 27, W. Misiewicz.

La Chefa Estraro petas chiujn grupojn sendadi regule chiu-
monate raporton pri sia agado por eventuala ghia uzo en „P. E.”.

La grupoj estas petataj sciigi nin senprokraste pri la nombroj
de pagantaj membroj por plifaciligi al ni kolektivan sendadon de
„P. E.” por viaj membroj.

Ni rememorigas, ke (lau decido de la Ghen. Kunveno de dele-
gitoj en Łódź) la abono de „P. E.” estas deviga por chiu mem-
bro de la grupo, kiu pagas zł 8.— por chiu n-ro de la gazeto. La
pagon por la gazeto devas la grupo sendi chiu-monate kune kun
la membrototizo.

VARSOVIA INSUREKCIO EN 1944

La pola nacio festis 2-an datrevenon de la Varsovia insurek-
cio kontrau germanoj, kiu eksplodis la 1-an de agosto 1944 j.
kaj dauris 63 tagojn. Por kompreni moralan signifon de tiu chi
batalo oni devas konscii kondichojn, en kiuj batalis polaj patrio-
toj. Kontrau germanaj divizioj armitaj per plej modernaj bataliloj
kun aviadiloj, tankoj, peza artilerio ktp. staris pola junularo kaj
ech infanaro (12-jara Henriko Cichocki akiris alnomon „Tigro”
pro bruligo de germana tanko per celtrafa jheto de botelo kun ben-
zino) armita per revolveroj, boteloj kun benzino kaj precipé man-
grenadoj sen iu ajn ekstera helpo kaj sen suficha manghajho. Kaj
tamen ghi batalis 63 tagojn!

Tiu chi batalo dauris 63-foje pli longe ol defendo de Tobru-
ko per kelkdek mil da bonege armitaj sudafrikanoj, 12-foje pli lon-
ge ol la defendo de Nederlando, kiu kapitulaciis post 5 tagoj, 5-foje
pli longe ol la defendo de Belgujo. Bresto estis defendata de
germanoj dum 40 tagoj kaj kapitulaciis, posedante 40.000 da bo-
ne armitaj kaj provizitaj soldatoj kaj oni rigardas tiun chi defen-
don kiel eksterordinaran. Francaj „maquis”, kies potencon oni
kalkulis je 15 divizioj estis provizitaj de miloj da aliancaj aero-
planoj, dume amerikaj aviadiloj, kiuj devis provizi la varsoviajn
batalantojn per militmaterialo, flugis tro alte kaj la provizajho
falas plej parte sur terenojn okupitajn de germanoj.

63 tagojn batalis polaj patriotoj inter la civila loghantaro de
la chefurbo, kiu samgrade suferadis kiel la batalantoj.

La germana vengho estis terura: kompleta bruligo kaj ruinigo
de la chefurbo, mortigo de centmiloj da loghantoj, elsendo de
pluaj centmiloj al germanaj koncentrejoj!

Kaj malgrau chiuj batoj de la sorto Pollando revivighis kaj
Varsovio rekonstruighas!

MEMORE AL TIUJ, KIUJ FORIRIS!

Weinstein Halina, estraranino de kelkaj varsoviaj esp. grupoj, konata propagandistino, mortis en Varsovia „ghetto“.

Weinstein Anna, malnova esp.-ino, mortis en Varsovia „ghetto“.

Pasztejn Eugenia, estraranino de „Laboro“ kaj V. E. S., gazumita en Treblinka.

Migacz Józef, instruisto en Nowy Sącz, murdita de germanoj la 9. 7. 1944 kiel garantianto.

Krenicki Ignacy dro, estrarano de „Konkordo“, gazumita en Treblinka.

Krenicki Izaak dro, estrarano de „Konkordo“, gazumita en Treblinka.

Wolkier Józef, U. E. A. — delegito en Gdańsk, pereis en koncentrejo.

Shapiro Natan, eldonisto, gazumita en Treblinka.

Zysman Juliusz, estrarano de A. E. R., murdita.

Brandszteter Mieczysław (M. Brand), poeto kaj jhurnalisto, mortis en Varsovio „ghetto“.

(daurigota).

LA UNUA POSTMILITA ESPERANTA RADIO DISAUDIGO EN VARSOVIO

La „Pola Radio“ chiam estis ne tro favora al Esperanto. Antaŭ la milito nur dank'al persona influo de nia neforgesebla prof. d-ro Odo Bujwid ghi de tempo al tempo disaudigis esperant-linvajn prelegojn.

Kompreneble, ke akau nun en la nova, demokrata Pollando ni, varsoviaj esperantistoj, klopodis che „Pola Radio“ pri la esperantaj disaudigoj kaj fine ni sukcesis. Chiulunde je horo 22 (lau MET) okazos informoj pri Polujo en Esperanto.

Mi kaj s-ro Edward Bugajski, nia parolisto, trovighas en la „disaudigejo“. Post momento ekbrilos la rugha signalo kaj „la unuan fojon sur la ondoj de „Pola Radio“ post sesjara turmentado eksonos nia bela Esperanto“.

Mi estas iom kortushita. Ja okazas komenco de la regulaj esperantaj radiodisaudigoj en nia lando!

Kaj emocie plue sonas la vortoj:

„...ni salutas vin, geesperantistoj de la tuta mondo“...

„...Antaŭ ol ni komencos niajn disaudigojn esperantajn ni devas honori la multnombrajn pollandajn esperantistojn, infanojn, junulojn, plenkreskulojn, aktivajn kaj pasivajn, turmentitajn en la germanaj koncentrejoj, kremaciejoj, brulantaj „getoj“, falintajn sur la batalkampo...“

Silento.

Kaj ree sonas la vocho jam pri la aktualaj demandoj de la moderna Polujo. La Disaŭdigo dauras.

Kaj nun nur de vi, karaj gesamideanoj, dependas la sukceso de niaj disaŭdigoj. Tial ne hezitu kaj tuj skribu multnombre kaj skribigu aliajn al „Pola Radio“, Warszawa, Koszykowa 8.

Ghis la reaudol!

I. Dratwer

Represo petata!

GRATULO EL PORTUGALIO

Ni ricevis leteron el Portugalujo, kies eltirajhon ni citas: „Verre emocian sensacion mi sentis, kiam mi eklegis vian allogan gazeton „Pola Esperantisto“ kaj mia plumo ne povus ne movighi por gratuli miajn polajn kamaradojn, kies energion ne sukcesis formortigi la fia nacia kalkanumo! La esperantistaro en Polio estis kaptita de por mi stranga vidmaniero pri unueco kaj la plej malsamaj tendencesperantistoj kunaktivas en unu sola organizajho, en unu sola gazeto!... Mi profitas la okazon por saluti la polan esperantistaron, kiu denove rajtas aktivi post tiom longa katakombapriodo!...

Gravan sukceson kaj prosperon!

Frazao Faria

R. Jose Estevao, 26, 3, -E.
Lisboa.“

La Redakcio elkore dankas samideanon F. F. pro liaj kuraghigaj vortoj

POLA KRONIKO

El Varsovio.

La 3-an de agosto okazis la unua datreveno de fondo de la laborista grupo „Verda Stelo“ che le shtata alkoholmonopolo. La grupon senlace gvidas s-no W. Majewski. En la bele ornamita klubejo de la monopolo kunvenis kelkdeko da gesamideanoj. Sekvis salutparoladoj de reprezentanto de la Entreprena Konsilantaro, Kulturkomisiono kaj de varsoviaj esperantistoj. Ankaŭ okazis koncerta parto.

Ekspozicieto de esperantaj libroj kaj esperantajhoj plibeligis la aranghon.

Varsovion vizitis sveda samideano Anders Roos el Norrköping, kiu kunportis kun si donacojn por polaj esperantistoj.

S-no A. Roos parolis ankau per la „Pola Radio“. Lian paroladeton, tradukitan ankau pollingve sekvis ludado kaj kantado de nia himno.

S-no B. Czechowski gvidis kurson de Esperanto por 10 geinstruistoj.

Varsovia gazetaro presigas de tempo al tempo sciigojn pri Esperanto.

ESPERANTA MOVADO SUR POLA MARBORDO

En Gdańsk 8-an de septembro okazis unua postmilita kunveno de esperantistoj, lau iniciato de ne longe antaue veninta el la koncentrejo tra Svedujo fervora kaj agema esperantistino Sino Edwarda Kamińska. Kunvenon partoprenis kelkdeko de esperantistoj, kiuj unuavice per kelkminuta silentado honoris la memoron de tiu-chi granda nombro da polaj samideanoj, murditaj de germana buchistaro. Post tre interesa prelego de s-ano Kamiński, oni decidis fondi la filion de A. E. P. Nove-elektita estraro konsistas el: A. Kożuch (prez.), E. Kamińska (sekret.), K. Majorkiewicz (vicprez.), Toczyński (propag.). La konveno estis antaue anoncita en radio de Gdańsk. Krom tio ankau estis mallonga mencio pri Esperanto en sama radio. Membroj de nova asocio plendis multe pro manko de libroj kaj diversaj instruiloj en Esperanto. Kauzo bone konata. Germana okupado tute neniigis niajn asociajn kaj privatajn librarojn. Kiel bone estus, se eksterlandaj esperantistoj, kiuj eble ne tiom suferis dum tiu-chi milito, kaj kiuj posedas superfluajn, au malnovajn esperantajhojn, sendu ilin al ni. Ni estus ege dankemaj. Portempa adreso de nova filio estas: A. Kożuch, Gdańsk-Oliva, Asnyka 2.

En Gdynia en Liceo de Belaj Artoj oni komencis instruadon de Esperanto kiel devigan instruobjekton. Lernantoj de tiu-chi instituto petas chiujn, kiuj interesighas pri belaj artoj, au studentaj ankau chi-tiun branchon de artismo, ke ili skribu al la liceo por intershanghado de desegnajhoj, fotoj kaj aliaj interesaj objektoj. Ankau estus dezirinde, sendi al direkcio de la lernejo gratulleterojn pro la enkonduko de Esperanto. Adreso de la lernejo estas: Gdynia, Korzeniowskiego 43, Miejskie Liceum Sztuk Plastycznych.

En plej granda chiu taga jhurnalo de marbordo „Dziennik Bałtycki“ aperis interesa artikolo pri Esperanto de s-ano Janicki.

Prof. J. Toczyński

SCIIGOJ DE POLA ESPERANTA SKOLTARO

Esperanta movado inter polaj skoltoj chiam kreskas. Lau anoncoj, kiuj venis al mi, nuntempe okazas esperantaj kursoj por skoltoj en kelkaj lokoj, nome: en Varsovio, Łódź, Gdynia, Wałbrzych, Zuraczyn, Krakovo kaj Toruń.

Intereso por esperanto generale inter skoltoj estas multe pli granda ol antaŭ la milito. Grava malhelpo estas manko de skoltaj instruistoj de nia lingvo. Tiakauze mi petas chiujn E-instruistojn, ke ili proponu al skoltaj lokaj komandetoj lecionojn de esperanto, ĉar tre ofte ili ne scias, kien sin direkti en ties bezono.

Skolta Esperantista Ligo ekkomencis sian agadon, post reveno de militservo Douglas Mourphy, ĝhia ĉef-komisaro. Agento por Polujo restas dumtempe antaŭmilita agento J. Toczyski (Gdynia, Morska 77).

Ĉefa Skoltino de la mondo Lordino Baden Powell antaŭ nelonge esprimis sian tre favoran opinion pri esperanto, konsilante eĉ, ke oni faru propagandon ĉe O. U. N., por akcepti esperanton kiel lingvon de kongresoj, kaj enkonduki ĝin en lernejojn de la tuta mondo.

J. T.

RADIO—DISAUDIGOJ

Bern, Svisujo, ondolongo 47,28 m, dimanĉe de 19,10—19,20 h.

Moravska Ostrava, Ĉeĥoslovakujo, ondolongo 325 m, marde kaj vendrede de 22,50—23,00 h.

Praha, Ĉeĥoslovakujo, ondolongo 1571 m, ĉiutage de 21,00—21,30 h. kaj ondolongo 470 m, lunde kaj ĵhaude de 22,50—23,00 h.

Varsovio, Pollando, ondolongo 49,06 m, lunde de 22,10—22,25 h.

Sofia, Bulgarujo, ondolongo 352 m, merkrede de 17,00—17,15 h.

KIU HELPOS?

Garewicz Jan petas informojn pri la sorto de sia frato Juliusz Garewicz, Lodza esperantisto, nask. 4. V. 1920 en Łódź, studento de Varsovia Universitato, kiu post la insurekcio en Varsovio en 1944 estis sendita al koncentrejo en Germanujo. Kiu posedas iun ajn sciigon pri li estas petata sendi ĝin al la Redakcio de „P. E.”.

DANKON

al 8-anoj Engelbrecht Hansen, Holbek, Danujo kaj Josef Karl, Luzern, Svisujo por senditaj libroj.

Responde al kelkaj demandoj ni informas, ke intern. respondkuponoj validas en Pollando, do oni povas sendi ilin al ni sentime.

De la administracio. Grupoj kaj samideanoj, kiuj ricevis „P. E.” por komisia vendado, estas petataj sendi kalkulon por venditaj ekzempleroj. Bonvolu sendi monon por ili kaj nevenditajn resendul!

LERNOLIBRO DE ESPERANTO

prilaborita de prof. M. Sygnarski laŭ metodo de pastro Cseh aperos en nelonga tempo. Antaŭmendojn kaj pagojn akceptas la Ĉefa Estraro de A. E. P., Kraków, Rynek gł. 34, P. K. O. — konto IV — 196, Związek Esperantystów w Polsce.

PROPAGANDA SEMAJNO

La Ĉefa Estraro de A. E. P. decidis aranĝi Propagandan Semajnon de Esperanto en la tagoj de 15.—22. XII. 1946. Dum tiu ĉi tempo estos aranĝita Vespero je memoro de nia Majstro, propagandaj prelegoj kaj aliaj entreprenoj. Ĉiuj grupoj estas petataj komenci jam nun preparajn laborojn por tiu ĉi celo. Estas projektata eldono de propagandaj flugfolioj.

KORESPONDADO

B. Bultemeyer, Jan van Galenstraat 86 I, Amsterdam (W) Nederlando, 35-jara, kontoristo deziras korespondi pri momentaj aktualaj temoj.

Hruška Josef, Ĉeske Budejovica — IV, Machova 622 (Ĉeĥoslovakujo), 43-jara, librotenisto deziras korespondi kun samprofesia kamarado, intershanghas poshtmarkojn.

AMIKOJ EN TUTMONDO!

Mi tre salutas Vin kaj deziras ĉion bonan al Vi! Post kruela milito por mortigitaj — gloron! Por Iliaj familioj — kondolencon!

Al vivantaj Amikoj mi ŝatas voki — renovigu ni nian korespondadon! Bol. Czechowski, Pollando, Varsovic, Aleja Przyjaciół 9.

Piotrowski A., Kraków, Rynek gł. 34, O. K. Z. Z. akceptas antaŭmendojn por „Plena Vortaro de Esperanto“, 1.000-paĝa, riĉe ilustrita, 3-a eldono, prezo ankoraŭ nekonata, kaj abonpagon por „Sennaciulo“, organo de SAT, tutjara abono zŝ 150.—.

DE LA ADMINISTRACIO

Ni atentigas, ke tiu ĉi numero estas sendata al ĉiuj dezirantaj aboni ĝin. Sekvontan n-ron ricevos nur la pagintoj de la abono. Nia konto P. K. O., Kraków IV — 1096, Związek Esperantystów w Polsce (Asocio de Esperantistoj en Pollando). El eksterlando ni akceptas internaciajn respondkuponojn.

Che demandoj aldonu nepre poshtmarkon au respondkuponon por respondo.

GARANTIA FONDO (daurigo)

s-ano Walas Franciszek, Bielsko	zŝ. 30.—
„ Kuczer Ludwik, Kraków	zŝ. 100.—
„ Rauczyński Ryszard, Kraków	zŝ. 500.—

La lasta alvokas s-anon Marczykiewicz Antoni, Kraków, Grodzka 9 al pago por la Garantia Fondo.

RICEVITAJ GAZETOJ

La Progresanto, Nro 7/46, adr. G. J. Degenkamp, Postbus 8002, Amsterdam — W., Nederlando.

Heroldo de Esperanto, Nro 1—3/46, 5/46, adr. T. Jung, Harstenhockweg 223, Scheveningen, Nederlando.

La Kosmopolito, Nro 6/46 kaj Sennaciulo, organo de S. A. T., Nro 7 kaj 8/46, adr. 67 avenue Gambetta, Paris 20.

La SAT-ido, organo de portugaliaj laboristaj esperantistoj, adr. nemontrita.

American Esperantist, Nro 5—6/46, adr. G. Allan Connor, 114 West 16th Street, New York, 11, N. Y., Usono.

Cykelbilisten, Nro 1/46, adr. Säby, Svedujo.

Libera Tribuno (antaŭe „Per unu voĉo“), Nro 1/46, adr. Postkesto 7356, Johannesburg, S. A.

Triglav, organo de Slovenia Esperanto=Ligo, Nro 4—5/46, adr. Ljubljana, Cankarjevo nabrezje 7/1, Jugoslavio.

Flandra Esperantisto, Nro 1—7/46, adr. Pieter van Humbeekstraat 3, Brussel-West.

Irlando Vokas Nro 9/46, adr. Lorcan O hUiginn, Sonas, Dundroma — Dublin, Irlando..

Svisa Espero, organo de Svisa Esperanto-Societo, Nro 3—4/46, adr. Neuveville (Berne), Svisujo.

Espero Katolika, organo de IKUE, Nro 183, 184, adr. L. G. C. de Jong, Roelofarendsveen, Nederlando.

Atentul! Chiujn pagojn t. e. kotizon por A. E. P., abon-pagcn por „P. E.“, pagon por libroj direktu al P. K. O. konto: IV — 1096 Związek Esperantystów w Polsce (Asocio de Esperantistoj en Pollando), Kraków.

*

Libroj riceveblaj che Admin. de „P. E.“:

W. Reymont. En fumejo de l'opio	zł 8.—
J. Zuławski. Pax	zł 15.—
Kabe. Internacia Krestomatio	zł 35.—
V. Avsejenko. Fraulino Suzano	zł 25.—
A. Grabowski. Postrikolto	zł 5.—
S. An-ski. Dibuk	zł 15.—
Fouque. Ondino	zł 35.—
Unua kajero	zł 10.—

Por afranko aldonu 10% al ĉiu sumo. Livero pro malgranda provizo sendeviga.



ABONO: jare zł 100.—, duonjare zł 55.—. Por la jaro 1946 t. e. de majo ghis fino de l'jaro zł 70.—. Aparta numero zł 12.—, eksterlando 2 intern. respondkuponoj.

ANONCOJ: 1/2 pagho zł 1.000.—, 1/4 pagho zł 500.—, 1/8 pagho zł 250.—. Korespondado: 1 vorto zł 2.—.

PRENUMERATA: rocznie zł 100.—, półrocznie zł 55.—, Za rok 1946 t. j. od maja do końca roku zł 70.—. Numer pojedynczy zł 12.—, za granicą 2 kupony międzynarod.

OGŁOSZENIA: 1/2 strony zł 1.000.—, 1/4 strony zł 500.—, 1/8 strony zł 250.—. Korespondencja: 1 słowo zł 2.—.

Redaktas: Komitato.

Eldonanto: Asocio de Esperantistoj en Pollando.

Adreso de Redakcio kaj Administracio: Kraków, Rynek Gł. 34, ofic., III p.